# EVOLUADO DE LA SUNSISTEMO KAJ DE L'HOMARO (laŭ B.G.D)

(Por helpi al la komprenado de "Sur la Monto")

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| 3 | ♄ | Primara | Blanka | Hebraismo |
| 4 | ♃ | Sekundara | Ruĝa | Kristanismo |
| 5 | ♂ | Terciara | Flava | Homaranismo |
| 6 | ☉ | Homa | Hermeso | Demokratismo |
| 7 | ♀ | Vegetala | Elamo | Teokratismo |
| 8 | ☿ | Animala | Asuro | Plutokratismo |
| 9 | ☽ | Glacio | Magio | Mistikismo |
| 6 | ♁ | Kvaternara minerala | nigra-Sumero | Idolismo - Aŭtokratismo |

## Statika Stato.

| | | | |
|---|---|---|---|
| 0 | ♇ | Plutono | |
| 1 | ♅ | Urano | |
| 2 | ♆ | Neptuno | |
| 3 | ♄ | Saturno | |
| 4 | ♃ | Jupitero | |
| 5 | ♂ | Marso | |
| 6 | ♁ | Tero | Primara |
| 7 | ♀ | Venuso | Sekundara |
| 8 | ☿ | Merkuro | Terciara |
| 9 | ☉ | Suno | Kvaternara |

- Kvaternara → Minerala, Vegetala, Animala, Homa
- Homa → Blanka, Ruĝa, Flava, Nigra
- Nigra → Sumero, Elamo, Asuro, Hermeso
- Hermeso → Hebraismo, Kristanismo, Homaranismo, Idolismo
- Idolismo → Aŭtokratismo, Teokratismo, Plutokratismo, Demokratismo

| | | |
|---|---|---|
| Tero | : | 268.738.560 |
| Kvaternara | : | 22.394.880 |
| Homa | : | 1.866.240 |
| Nigra | : | 155.520 |
| Hermeso | : | 12.960 |
| Idolismo | : | 1.080 |
| Demokratismo | : | 90 |
| | | 293.169.330 |
| Tuta Tera ciklo | : | 540.000.000 |
| Fajro-akvo | : | 180.000.000 |
| Aero-Tero | : | 180.000.000 |

Apero de la Luno: dum la 1970a jarmiliono de la Suno.
Apero de Hermeso: dum la tria posta jarmiliono.

Ĉiu kvarobla ŝtupo konsistigas detruiĝociklon de la antaŭa kaj ĝian laŭtempan duonan parton; ĉiu kvara nomo konsistigas restaĵon, kiu aldoniĝas al la kvara de la antaŭa ŝtupo. Por kalkuli la ciklodaŭrojn, multipliki ĉiun lastan ŝtuponomon per 12 por ricevi la daŭronombron de la kvara antaŭa; por la sekvantaj, dividi. La bazo estas: 2.160 jaroj, daŭro de la Kristanisma ciklo, laŭ la retroiro de la vernalpunkto tra la zodiaksignoj. La sep tagoj de la Kreado komenciĝas post la 180.000.000 da jaroj de la unua formiĝa parto de la Tero, inkluzive de Primaro, interne de la unua Marso.

## Dinamika stato.

Ĝi komenciĝis ĉe la kvara Tago de la Kreado, sekve de la disiĝo, disde la Tero, de la Luno, falo kaj glaciiĝo sur la Tersurfacon de l' "ĉielaj akvoj" , kaj apero en la ĉielo de la du "lumigiloj" kaj de la steloj kaj planedoj. Tiam la Tero ne plu unue rolis, sed fariĝis nur bazo de pluevoluado pro la rekta efikado de la Suna, Luna, planeda kaj stela radiadoj. Aliel dirite: tiam la Suno, ĉefa efikanto, fariĝis la centro de l'voluado, kaj pro tio la antikvuloj lokis ĝin meze de la planedoj , ĉe la loko de la Tero. Galileo Galilei nenion "nekonatan" elkovris, kaj pro tio estis silentigita, por ke tiu "sekreto" de l' "Inicado" ne estu rivelita.